

La perpoŝta libropruntado, la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds
kaj belaj esperantaj poemoj

Claude Gacond, 260-a radioprelego, 1968.10.02 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La publiko ĝenerale ne scias, ke en iu ajn publika biblioteko oni rajtas prunte mendi esperantan libron, eĉ se tiu biblioteko ĝin ne posedas.

A.- Ekzistas traktaĵo inter la bibliotekoj por la pruntado de fakaj libroj. Do se esperantisto deziras legi libron de longe elĉerpitan, li rajtas iri al sia urba publika biblioteko kaj peti ĝian prunton. Li donas la ekzaktan titolon kaj se eble la nomon de la aŭtoro kaj petas la funkciigon de la interbiblioteka libro-pruntado. Tiu servo estas senkosta.

Cl.- En Svislando tiu servo funkcias de longe. Ĝi eĉ estas duobligita de perpoŝta pruntado. Jen kiel tiurilate esprimiĝis Nadia Lenin, la edzino de la granda revoluciulo. Ŝi skribis al amikoj en Sörenberg, vilaĝeto perdita en Berna Oberlando, piede de la monto Rothorn, apud la vilaĝo Brienz. Aŭdu :

A.- « *En Sörenberg, ni plej agrable enloĝiĝis. Nin ĉirkaŭas arbaroj kaj altaj montoj ; neĝo eĉ kovris la supron de Rothorn. La poŝto funkcias kun reguleco vere svisa. Kaj montriĝas, ke eĉ en domaro perdita en la monto, kiel estas Sörenberg, oni povas senkoste kaj post memelekto ricevi librojn de la berna kaj zurika bibliotekoj. Sufiĉas sendi al la biblioteko poŝtkarton, indikante sian adreson kaj petante sendigi tiun aŭ tiun libron ; neniu postulis iun ajn legitiman informon, ateston aŭ garantion pri tio, ke la libro ne estos fuŝita : estas la absoluta kontraŭo de la burokratismo en Francio. »*

Cl.- Tio estis skribita en la somero 1915. Verŝajne nun ankaŭ funkcias simila perpoŝta libro-pruntado en Francio, malgraŭ la burokratismo !

A.- Nadia Lenin daŭrigas : « *Post du tagoj ni ricevis la petitan libron. Ĝi estis envolvita en kartona koverto ; slipo ligita per ŝnuro al la skatolo havis sur unu flanko la adreson de la petinto kaj sur la alia adreson de la biblioteko, kiu sendis la verkon. Tiu sistemo permesas utile labori en plej perdita loko. »*

Cl.- Kaj Nadia Lenin konkludas :

A.- « *Iliĉ laŭdas la svisan kulturon. Li laboremas... »*

Cl.- Al la svisaj samideanoj ni diras : Imitu Lenin, pruntante per poŝtkarto librojn el la publikaj bibliotekoj. Kaj skribu al la biblioteko en La Chaux-de-Fonds por ricevi esperantajn verkojn. La biblioteko de la Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo devas esti utila al ĉiuj.

A.- Al la fremdaj samideanoj ni diras : Ankaŭ imitu Lenin por vidi, ĉu simila servo funkcias en via lando.

Cl.- Vi eble tiel povus provi ricevi la libron *Ora Duopo*, kiu jubileas pri Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay. Ĝi estis eldonita en Budapeŝto en 1966.

A.- La svisaj samideanoj sciu, ke en la biblioteko de La Chaux-de-Fonds troviĝas du ekzempleroj de tiu libro.

Cl.- Ĝin pruntante ili povos legi belajn poemojn kaj prozaĵojn.

A.- Ili vidos, kiel Baghy provas imiti sonojn aŭ esprimi atmosferojn.

Cl.- Jen ekzemplo :

Hirte flirte flugas haroj,
siblas vintra vent'...

La perpoŝta libropruntado, la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds
kaj belaj esperantaj poemoj
Claude Gacond, 260-a radioprelego, 1968.10.02 & 05

Morde torde ŝiras koro
larmoj kaj la sent'...

...

Brue skue blekas vento,
knaras ligna dom'...
Ĝeme treme sin forkaŝas
besto kaj la hom'...

A.- Ili amuziĝos legante pri ranoj :

Cl.- Sub tegmento staris kuvo
dum somera densa pluvo,
sed tegmento baris pluvon,
pluvo falis apud kuvon,
ĉar el pluvo kuv' ne havis,
pro l' soifo ranoj kvakis :

Kvavak kvavak kvak kvak
akva kuvo, akva kavo
kvaj kvaj kvaj
kvakas ni al Akviavo
kvak kvak kvak
kvar kvakantoj kvardekvoĉe
kvartet-kvakas plenriproĉe
pro mankhav' de l' kava kuvo
en la akvokuv' sen pluvo
kvak kvak kvak!!!

A.- Ĉe Kalocsay ili trovos eble pli severajn versojn. Ili povos mediti pri la stulto de multaj homsintenoj, kaj ĉefe pri la senhomeco de la militaj agoj. Ili trovos tiun mediteman aktualaĵon :

Cl.- Subtile kanti en ĉi murd-epoko
pri l' propra vivo, kiam ja milmiloj
per bomboj, tankoj, pafoj, pendigiloj
pereas, vere ŝajnus aĉa moko.
La tuta riĉa poezia stoko :
la luno, steloj, floroj, birdotriloj,
la delikataj amaj maltrankviloj
disflugas en la blov' de ĉi siroko.

La morto regas nun, la mort' avida,
amasa mort', vulgara kaj sordida,
sen cipresbranĉoj, sen solen' majesta.
Kaj kiel perdis dignon nu la morto,
la am' aspektas same io besta :
la ambrakumo ŝajnas seksperforto.

A.- Tiaj poemoj atingas universalecon kaj altigas esperanton al vera mond-lingvo. Legante la libron *Ora Duopo*, oni komprenas, kiom helpis la talento de Kalocsay por kreskigi esperanton. Tiurilate aŭdu lin:

Cl.- Ho Esperanto, mia temo

La perpoŝta libropruntado, la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds
kaj belaj esperantaj poemoj

Claude Gacond, 260-a radioprelego, 1968.10.02 & 05

amata, kiam la kantemo
min kaptas, vidu, lastatempe
min jam minacas anatemo,

ĉar mi kuraĝis vin tro ami,
jes, oni volas min proklami
hereza, ĉar per nova brilo
kaj riĉ' mi volas vin ornami.

Sed mi toleras sen lamento ;
defendas min la argumento ;
palacon pompan alpostulas
la pompe firma fundamento.

Ni do konstruu sen ŝancelo
tiun palacon de la Belo.
Por kiuj fundament' sufiĉas,
nu, tiuj loĝu en la kelo!

A.- Ĉu vi ne havas envion legi similaĵojn ? Tiam uzu la perpoŝtan libro-pruntadon de la publikaj bibliotekoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-